

Protokolo de la 37-a Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS okazinta en Banjaluko (BA) dum PSUS BA.

Kunsidtempo: Vendredo, 2008-09-05, 17:20–18:30.

- 1) *Formalaĵoj.* La asembleo okazas laŭ la kunsidregularo. La kunsidon gvidas senatano OProf. Quednau; la protokolon verkas OProf. Fössmeier. La kvorumeco ne estas pridubata.
- 2) *Ĝenerala raporto.* ADoc. Dr. Macko raportas, ke la societo Akademidomaro estis dissolvita. La komandituloj interkonsentis transpigi la restantan monon al AIS. Financa raporto ne okazas, ĉar ne ĉeestas la trezoristo aŭ komisiito de li.
- 3) Dum la antaŭa kunsido en septembro 2007 ADoc. Lewoc apelaciis kontraŭ sia forpelo el AIS. Ĉar poste ŝi ne reagis al la sendita informo pri sia eksigo (sendita je 2007-10-06 sub la registra numero RT 2285 2979 6DE de la germana poŝto), la apelacio estas unuanime rifuzita.
- 4) La ĜA unuanime decidas, ke la regulo pri la 3-a de septembro (studad-regularo 4.1) validu nur, kiam SUS okazas almenaŭ parte en San-Marino. La ĜA taskas al OProf Quednau serĉi universitatan partneron por okazigi SUS-on paralele-sekve al la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. La ĜA alvokas ĉiujn profesorojn kaj docentojn de AIS varbi studentajn partoprenantojn por tiu planata SUS.
- 5) OProf. Quednau deklaras, ke la manko de docentoj partoprenantaj en PSUS BA montras, ke AIS troviĝas en kriza situacio kaj estas nepre bezonata la alvoko al titolo de efektiva membro de sufiĉa kvanto de laborpretaj sciencistoj, ĉar alikaze AIS en proksima estonteco mortos.
- 6) La ekzamenofico proponas, ke por la predikato “summa cum laude” estonte necesu pli ol 9/10 de la poentoj (anstataŭ almenaŭ 9/10). Unuanime akceptite.
- 7) *Diversaĵoj.* La sekva kunsido de la ĜA okazu dum la sekva SUS en la SUS-ejo.
- 8) La ĜA dankas al la organizantoj pro la bona organizado de PSUS BA kaj esperas, ke baldau okazos plia SUS en Banjaluko.

Banjaluko, 2008-09-05

H. D. Quednau, kunsidestro

R. Fössmeier, protokolanto